

Kiel disvastiĝas novaj aferoj?

Specife Esperanto

Arkones 2012

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

Antaŭrigardo

- Varbeblas (nun) nur 2 % el celgrupo
- Por longavida sukceso necesas (por Esperanto) informado, lernado, aplikado, bonaj spertoj, konigo de la spertoj
- Varbu en celgrupo de ĉ. 1000 – 10.000 homoj (prefere *intense* varbu)
- Politikistoj apenaŭ varbeblas

**Se homo *ne* scias,
kio estas Esperanto,
tiu *ne* lernos
Esperanton.**

**Se homo *malbone* scias,
kio estas Esperanto,
tiu *malverŝajne* lernos
Esperanton.**

**La perspektivoj de Esperanto
estas bonegaj,
ĉar apenaŭ iu scias,
kio vere estas Esperanto.**

**Se ĉiu scius kaj ne lernus,
mi senesperigûs.**

Ekzemplo de celgrupeto

Celgrupeto: 1.000 studentoj/gimnazianoj/retanoj

- Vi varbas kaj varbadas, tage kaj nokte :-)
Preskaŭ ĉiu studento/gimnaziano/retano ricevis **almenaŭ 7 informojn.**
- En via celgrupeto pli ol 50 % tute bone scias, kio estas Esperanto hodiaŭ (int. lingvo, renkontiĝoj, interreto, libroj ...).
- Sed al via Esperanto-kurso venas nur 1 - 2 % de la studentoj, 10 - 20 homoj.

Kial ***nur*** 1 - 2 %?

Eble eĉ *ne* venis 1 – 2 %, ĉu?

- Ĉu vi metis la utilon en la ĉeflinion:
"Amikoj en la tuta mondo" aŭ
"Vojaĝi al multaj landoj" (aŭ simile)?
(Ne: "Esperanto" kiel ĉeflinio)
Pli bona ĉeflinio: Eble **dekfoja** efiko!!!
- Ĉu **grafike bela**?
- Ĉu vi **ripetadis** la varbadon kaj atingis 7 ĝis 10 kontaktojn? Ĉu per afiŝoj + slipoj + informiloj...?
- (Ĉu vi kontrolis, ke >50 % scias pri Esperanto kaj **renkontiĝoj**, **interreto**, **muziko**, libroj ktp.?)
- Ĉu al **14–25-jaruloj**, lingvemuloj, programistoj?

Enketo (ekzemple)

- Ĉu la nocio "Esperanto" estas al vi konata?
Kio tio estas?
- "Ni volas enketi, kion vi scias pri Esperanto"
 - Ĉu Esperanto estas rapide lernebla?
 - Ĉu ekzistas retpaĝoj en Esperanto?
 - Ĉu ekzistas Facebook, Firefox, Ubuntu, Google Translate en Esperanto?
 - Ĉu ekzistas muziko, kantoj, libroj?
 - En kiom da landoj estas Esperanto-parolantoj?
 - "La ĉina registaro ĉiutage publikigas novaĵojn en Esperanto." Ĉu vera/ne vera?

Venis 2 %. Kial *nur* 2 %? Kial 98 % *ne* venis?

Vi cerbumas...

- Ĉu vi donis la ĝustajn **informojn**?
- Ĉu vi bone varbis, per bona **teksto**, **ĉeflinio**?
- Ĉu bela **grafiko**?
- Ĉu "la **angla definitive venkis**"?
- Ĉu Esperanto simple "ne havas **utilon**"?
- Ĉu "la **mondo ne deziras Esperanton**"?

???

Ne, ne, ne...

Tute normala afero!

Por *novaj aferoj* eblas varbi (unuafaze)

nur ĉ. 2 % de la celgrupo!

Por preskaŭ ĉiaj produktoj kaj servoj

Vi brile sukcesis!!!

(Mendu ĉampanon...!)

Kiel disvastiĝas novaj aferoj?

(Poŝtelefonoj, tuŝekranoj, elektronikaj libroj, Eo...)

Celgrupo ekzemple 30 mio. da poloj; poŝtelefonoj

Fazo 1 a: Vi **varbas** 2 % (600.000 homojn)

Fazo 1 b: Ili **aplikas** la novan aferon (vi helpas)

Fazo 1 c: Ili havas **bonan sperton** (ni esperas...)


Fazo 1 d: Ili **parolas** pri sia sperto (vi ankaŭ)

Se tio sukcesis:

Fazo 2 a: Vi varbas 12 %, 3,6 mio. da homoj

Fazo 2 b, c, d: Aplikado, bona sperto, priparolado

Se bone: Fazo 3 a: Vi varbas 34 %, 10,2 mio. ...



Lu Wunsch-Rolshoven: Disvastiĝo de novaj aferoj

Unuopaj grupoj sinsekve

- 2 %, **Pioniroj/novigantoj**: junaj, altedukitaj, iom rande de sia socia grupo: rigardo eksteren, nekutimaj/*strangaj*. Deziras novecon
- 14 %, **Fruaj uzantoj**: opinigvidantoj, rel. junaj, alta socia statuso, altedukitaj. Deziras utilon
- 34 %, **Frua plimulto**: supermezuma statuso. Adoptas, se la aliaj de la grupo adoptas
- 34 %, **Malfrua plimulto**: skeptikaj, submezuma statuso
- 16 %, **Malfruuloj**: pli aĝaj, malmulta kontakto

Necesa por la disvastiĝa proceso:

- Vi **plene atingas** la unuan grupon (2 %) (do ripeta informo, ĉ. sep konsciaj kontaktoj)
- Ili vere **aplikas** (eble vi helpu ilin "ensociiĝi")
- Ili havas **bonajn spertojn** (eble vi zorgu pri tio)
- Ili **parolas pri la bonaj spertoj** (eble ankaŭ vi)

- Vi pluvarbas kaj atingas la duan grupon (14 %)
- La dua grupo aplikas, ĝuas, parolas pri tio...

Sufiĉas relative *malgranda* celgrupo

Por Esperanto sufiĉas ekzemple unu gimnazio aŭ unu universitata instituto aŭ unu ret-forumo (ekz. pri lingvoj aŭ matematiko/programado)

- 1000 lernantoj/studentoj/regulaj forumvizitantoj
- 500 interesitaj pri eksterlandaj kontaktoj
- 2 %, eble 10 homoj varbeblaj unuafaze (1 kurso)

Varbado: **farebla tasko** (laŭ tempo kaj mono)

Sed necesas bona kaj *intensa* varbado:

- 10 000 varbokontaktoj, ekz. per
- 5 afiŝoj dum 3 monatoj
- informiloj, poŝtkartoj, slipetoj, T-ĉemizo, stando



Lu Wunsch-Rolshoven: Disvastiĝo de novaj aferoj

Ne *tro malgranda* celgrupo!

(Ja varbeblas unuafaze nur 1 – 2 %)

Inter 50 homoj eble ***unu*** varbeblas
(se bonŝance)

Ĉu miraklo, se ***neniu*** el via familio kaj viaj bonaj
amikoj lernis Esperanton?
(Ĉu estas entute 50 homoj inter 14 kaj 25 jaroj?)

Malsamaj celgrupetoj – malsamaj fazoj!

- Gimnazio sen varbado: Eble neniu parolanto
- Gimnazio kun unujara varbado: Dek parolantoj
- Gimnazio (intensa, longa varbado): 20/30/... (?)

Homoj laŭ lingvokono

- Neniu nacia fremdlingvo: ĉ. 1 el 10.000: E-o
- 1 nacia fremdlingvo: ĉ. **1 el 1000** parolas E-on
- 2 naciaj fremdlingvoj: ĉ. 1 el 100 parolas E-on
- 3+ naciaj fremdlingvoj: eble 1 el 30 aŭ 50 (?)

Matematikistoj/programistoj

relative ofte parolas E-on, ĉu 1 el 100 ???

Eblas progresigi Esperanton en diversaj celgrupetoj sendepende

Gravas via varbado, instruado kaj ensociigo
en via celgrupo:

Taŭga celgrupo

Zorga laboro dum longa tempo, prefere jaroj

Multega pacienco

Varbu pli intense ol vi supozas, ke necesas!

Eble kontrolu la rezulton de via informado

Tiam eblas konsiderinda sukceso!

Ĉu disvastiĝo aŭ disvastigo?

- Plej efike: Disvastiĝo (per uzantoj) kaj disvastigo (per entrepreno, ŝtata institucio; per grupetoj; apenaŭ per *granda* asocio)
- Disvastiĝo nur per unuopaj uzantoj malrapidas!

Kial granda asocio malofte efike laboras?

- Mancur Olson. *Logic of Collective Action*, 1965: En granda grupo oni malpli laboras por la grupoceloj ol en malgranda grupo.

Politikistoj

- Ne pioniroj! Opinigvidantoj, ĝenerala opinio
- En grupo 2 (fruaj uzantoj) aŭ 3 (frua plimulto)
- Post la unuaj 2 %, eble post la unuaj 16 %
- Politikistoj apenaŭ helpas fari la komencon, varbi la unuajn 2 % kaj la postajn 14 %.
- Ni entombigu niajn esperojn kaj agu mem!

Sojla maso/amaso

- (ankaŭ: "Kritika maso/amaso")
- Atomkerna fiziko: Proceso memstariĝas
- Socisciencoj: Sufiĉa elano en socia sistemo, ke ĝi fariĝas mem-subtena kaj kreas pluan kreskon (eĉ sen la origina aganto)
- Esperanto: Ŝajne atingita delonge. Komunumo tenas grandecon, ellaboras uzadon
- Sed indas rapidigi la disvastiĝon, subteni ĝin

Resume

- Eblas nun atingi ĝis 2 % de (bona) celgrupo
- Gravas informado, lernado,
aplikado, bona sperto, konigo de tio
- **Bona varbado:** Celgrupo (1000–10.000 homoj, 14–25-jaruloj, lingvemuloj, programistoj).
Utilo en la ĉeflinion (Amikoj en la tuta mondo...)
Intense ripetadu (**7 kontaktoj**)
- Politikistoj malverŝajne varbeblas por nia afero
- Stranguloj estas io normala ĉe novaj aferoj

Fontoj

- Everett Rogers. Diffusion of Innovations, 1962¹

Aplikado al komputiloj

- Geoffrey Moore: Crossing the Chasm, 1991
- Geoffrey Moore: Inside the Tornado, 1995

Varbado (por memori)

- David Ogilvy. Konfeso de varbisto
- Jay C. Levinson. Gerila merkato
- **Ondo de Esperanto: "Kreskigi Esperantujon"**

Lu Wunsch-Rolshoven: Disvastiĝo de novaj aferoj

Multan dankon pro via atento!

**Multan sukceson por via
informado kaj varbado!**

Resumo

- Eblas nun atingi ĝis 2 % de (bona) celgrupo
- Gravas informado, lernado, **aplikado, bona sperto, konigo de tio**
- **Bona varbado:** Celgrupo (1000–10.000 homoj, 14–25-jaruloj, lingvemuloj, programistoj).
Utilo en la ĉeflinio (Amikoj en la tuta mondo...)
Intense ripetadu (**7 kontaktoj**)
- Politikistoj malverŝajne varbeblas por nia afero
- Stranguloj estas io normala ĉe novaj aferoj